NOR FN Per ANC 47

# Normanda Esperanto Bulteno

- Organe de l'Union des Esperantistes de Normandie -
- Redaktas G. MAMMAUX, 27 rue Jules Ancel, LE HAVRE -
- N° 55 - - Julio 1960 -

## = SUKCESPLENA NORMANDA KONGRESO EN DOMFRONT =

La 29-a Normanda Kongreso ekiĝis la 14-an de Majo en Teatro de Domfront. S-ro Gaston VERON, prezidanto de la Kongres-Komitato salutis la ĉeestantojn kaj prezentis la samideanojn kiuj pripropagande parolos siavice pri Esperanto en diversaj fakoj.

Laŭ la programo, S-ro QUILLAU parolis pri Junular-Gastejoj - la kreado en Germanujo kaj disvastigado tra la tuta mondo, uzo de Esperanto inter iliaj membroj.
S-ro SAPERAS kompetente prezentis praktikan uzon de Esperanto en la Lernejo, ĝia pedagogia valoro eĉ pri studo de franca gramatiko.
S-ro LOISEL anekdote rakontis sian unuan internacian kongreson (Varsovio 59), kun pikantaj detaloj.
Poste, S-ro JOUIS temis pri Esperanto je la servo de Scienco, kaj kaptis la atenton de la aŭskultantoj malgraŭ la severeco de tiu titolo. Li abunde pruvis ke Esperanto havas riĉan dokumentojn en tiu fako kaj plene taŭgas en sciencaj laboroj.
Pro manko de tempo, S-ro BOSC ne kapablis fari sian paroladon pri komerco kaj turismo internaciaj.
Sub unanimaj aplaŭdoj, S-ro WILTSHIRE, neo-zelandano, salutis, Esperantlingve, la ĉeestantojn.
Alvenis elekto de la Reĝino 1960: 4 kandidatinoj prezentiĝis al la bonhumora konkurs-gvidanto, nia amiko Albert LETENDRE. Post la balotado (gejuĝantoj: S-ino BELLETRE, S-roj HUET, BOSC, FERET), li proklamis la rezultatojn: Reĝino: F-ino Madeleine MAHMOUD Honor-Fraŭlinoj: F-inoj Jacqueline TESSIER kaj Jocelyne MILLIARD. La tri venkintinoj ricevis multnombrajn donacojn je la nomo de donemaj Domfront'aj komercistoj.
Fine, balo, movoplena, ekiĝis sub vigla direkto de S-ro COUASNON,(la plej fama dancoorkestro de la regiono)... kaj finiĝis je la 3-a matene.

Dimanĉon 15-an - Labora parto de la Kongreso.
Oficiala malfermo de S-ro Maurice HUET, U. N. E.-Prezidanto kiu, per laŭdaj paroloj, salutas la partoprenantojn kaj gratulas la organizantojn (speciale, S-ron VERON, F-inon DEVERRE, S-ron BAZOGE). Lia parolado ĉefe temis pri la interna ideo: "... Belan heredaĵon lasis al ni la Majstro, li ekkrias. Jes, sed ankaŭ pezan! Efektive, lian agadon ni devas daŭrigi, ĉiam celantan al Paco ..."
Ne povis partopreni kaj senkulpiĝis: S-roj PERMANNE (Fécamp), SAGET (Elbeuf), POTTIER (Blangy-sur-Bresle), DUBUISSON (Le Havre), PARRINGTON (Rouen), CHATELAIN (Mézidon), PERRET (Domfront), HULLIN (Homfleur), S-inon VINCENT (Les Andelys).
Stariĝinte, la kongresistoj kantas "LA ESPERO" 'n.
S-ro VERON, la sindonema estro de la kongres-komitato diras siajn klopodojn, siajn pasintajn timojn kaj fine la sukceson, dankante la normandajn gesamideanojn kiuj veturis sur la longan vojon al Domfront, kaj ankaŭ ĉiujn kiuj helpis lin ... morale kaj mone.
S-ro HUET proponas ke oni elektu prezidanton por gvidi la debaton. S-ro Emile GASSE, ĉiam-entuziasma veterano plenumos tiun oficon, helpata de S-ro BOSC, Honor-prezidanto de U. N. E. S-ro GASSE precizigas ke tiu kunsido estas kunsido de ĉiuj Normandoj (ĉu UEA, ĉu SAT, ĉu aliaj fakoj). Normanda Unuiĝo larĝe malfermas siajn brakojn al ĉiuj Esperantistoj.

S-ro HUET prezentas la moralan raporton de la jaro. Oni povas facile konstati ke la progreso estas certa.

S-ro LETENDRE, kasisto, donas trankviligantajn ciferojn. Li ankaŭ parolis pri la konkurso "Campagne de Recrutement 1960/1961" kies regularo oni legos en tiu-ĉi numero de la Bulteno.

Poste, iu delegito de la diversaj grupoj prezentas la trafitajn rezultatojn.

EVREUX - S-ino BELLETTRE parolas pri kursoj kaj ĝenerala propagando (Esperantlingva akcepto al germanaj samideanoj okaze de ĝemeliĝo kun urbo Russelheim).

ROUEN - S-ro JOUIS parolas pri kursoj kaj la ĉiumonata kunveno; ankaŭ S-roj LOISEL kaj QUILLAU.

CAEN - Raporto pri kurso en O. M. J. de S-ro MARTIN, kiu havas la helpon de S-ro DUVAL kaj F-ino CHERIE.

ELBEUF.- S-ro CHAMARET anoncas la kreado de kurso en "Régie Renault", en Cléon.

LE HAVRE - S-ro HUET deklaras 5 kursojn (neŭtrala kaj laborista grupoj ambaŭ). Akcepto, dum Somero, al S-ro TUCKER kaj Ges-roj ŜNAJDER. Kvartalaj kunvenoj.

FECAMP - S-ro BOSC legas leteron de nia amiko PERMANNE kiu, nune, bezonas ripozon post senlaca batalado. S-ro Bosc, fondinto de la Fekampa grupo promesas studi kun la tieaj samideanoj la eblon revigligi tiun-ĉi iam-prosperan grupon.

VIRE - S-ro LEGRET diras kelkajn vortojn pri propagando kaj kurso.

DOMFRONT - S-ro VERON diras sian ĝojon. Estas hodiaŭ la datreveno de la fondo de la tiea grupo. Datreveno kiu permesas al la ĵus-naskiĝinta movado en Domfront eksplodigi la ĝojon kaj fidon al venonta prospero.

S-ro Huet parolas pri intencoj de la komitato, ĉefe: organizi turismajn vizitojn de normandaj urboj, eldoni franclingvan informilon por la oficialuloj.

La elekto, per levitaj manoj donas tiun komitaton por 1961: Prez. S-ro Huet, V/Prez. S-roj Pottier k Saperas, Sekr. S-ro Mammaux, Kasisto: S-ro Letendre, Administrantoj: F-inoj Chérie k Montagné, S-roj Féret k Véron.

La Kongresurbo 1961 estos LES ANDELYS. Laŭ S-ro Jouis, S-ino Vincent konsentos ĝin organizi. Laŭ eblo, S-ino Lavallée, kiu partoprenos la nacian kongreson en Montélimar, transdonos la saluton de la Normanda Unuiĝo.

S-ro Petit, UEF-komitatano gratulas la organizintojn kaj petas ke la laboro de la Normanda Unuiĝo translokiĝu sur internacia tereno.

La labor-kunsido finiĝas .... La kantistinaro de Evreux, sub kompetenta direkto de nia fidela amikino Nadège Bellettre alportas gajan voĉon al tiu fruktodona renkontiĝo.


La kongresantoj iras piede (kaj amase) al la urbdomo: la Domfrontanoj miras pro amplekso de tiu procesio, dum kiam la subrido de nia simpatiinda amiko Véron plilarĝiĝas.

En urbdomo, S-ro Urbestro kaj plena urbadministrantaro akceptas en la ĉefa salono; li levas sian glason al sukceso de Esperanto. Poste, S-ro Terrenoire, Ministro pri Informo, ekkrias: "Au moment où va s'ouvrir la Conférence au Sommet, il est fort regrettable de penser que les Grands ne pourront s'exprimer en direct, et je ne peux que vous encourager dans la voie sur laquelle vous vous êtes engagés avec foi." S-ro Petit, kaj normanda estraro kaptas tiun-ĉi frazon kun atento.

Tagmanĝado "à la Française" (manĝaĵoj nombraj, vinoj gajigantaj), bonhumoro komunikebla.

Foto, sub nune-griza ĉielo kaj frataj adiaŭoj ... ĝis la venonta jaro en ...

..... L E S A N D E L Y S .....



# 30$^{me}$ CONGRÈS NORMAND D'ESPÉRANTO

## LES ANDELYS (EURE)

## MAI 1961

C'est peut-être VOUS

qui serez l' INVITE DU CONGRES NORMAND les 6 et 7 MAI 1961 !

P A R T I C I P E Z   A   L A

C A M P A G N E   D E   R E C R U T E M E N T   1 9 6 0 / 6 1

Au Congrès de Domfront, nous avons accueilli avec joie le 500° Membre de l'Union des Espérantistes de Normandie, en la personne de F-ino TESSIER, d'Arnières-sur-Iton (Eure), membre du groupe d'Evreux, pépinière de jeunes Espérantistes. Ce résultat représente une progression d'environ 50 nouveaux membres par an. EN 1960/1961, nous voulons recruter 100 nouveaux Membres; c'est pourquoi nous lançons la Campagne dont voici le règlement:

Article 1.- Tout nouvel adhérent à U. E. N. recevra un numéro de 501 à 599

Article 2.- Dès que le numéro 599 aura été atteint, un tirage au sort attribuera à l'un des 99 nouveaux le n° 600. Ce Membre sera l'invité du Congrès 1961 aux Andelys, où il sera entièrement pris en charge (frais d'inscription, de séjour, de voyage et de banquet) par l'Union Normande, et recevra en outre plusieurs cadeaux-souvenirs.

Article 3.- Les anciens Membres d'U.E.N. conserveront, dès renouvellement de leur cotisation 1961, le même numéro que par le passé (numéros de 1 à 500), mais, un tirage au sort sera également effectué parmi eux, un mois avant la date du Congrès, et les 2 numéros sortants seront invités au banquet des Andelys aux frais d'U.E.N.

---

Rappelons que les cotisations U. E. N. sont de:

2 NFr pour les Membres actifs
1 NFr pour les enfants, étudiants, militaires et économiquement faibles,

Les cotisations sont à verser au C.C.P. ROUEN 283-40

UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE
63 Boulevard François 1er
LE HAVRE.

Toutes précisions sur ce concours seront fournies aux Présidents des groupes ou aux particuliers par le Trésorier de l'Union: S-ro LETENDRE, "Les Genêts", à SAINT-LAURENT-DE-BREVEDENT (Seine-Maritime), contre une enveloppe affranchie à leur adresse. Chaque Bulletin vous tiendra au courant de la progression de la Campagne. Au 1er Juillet 1960, nous avons atteint le n° 507. Qu'on se le dise!

= NIA VIVO =

ROUEN.- S-ro René LEPRETTRE, Esperantista Fervojisto, ricevis oficiale, de la manoj de Prezidanto BOSC, la insignon de MERITE CIVIQUE, pro sia senlaca propagando de universala lingvo en fervojista fako. Frata manifesto en stacidomo antaŭ SNCF-estroj kaj multnombraj Geamikoj.

BLANGY-SUR-BRESLE.- Gesamideanoj POTTIER ĝoje nin informis pri naskiĝo de sia filo Pascal (17/6/1960). Niajn gratulojn!
- Nia amiko Pierre POTTIER, vicprezidanto de U. N. E. gvidas Esperanto-kurson en "Cours Complémentaire".

SAINT-VAAST-LA-HOUGUE.- Naskiĝis ĉe Gesamideanoj LEFILLIATRE filo Bertrand. Al la Gepatroj, niajn gratulojn!

LE HAVRE.- 7 kandidatoj prezentis sin al ekzamenoj la 19-an de Junio. Ni deziras al ili plenan sukceson!
- La 1-an de Julio, la grupo akceptis S-ron Hans BAKKER, Nederlanda Samideano. Li ĉarmis nin per agrabla parolado pri sia lando. Partoprenis tiun kunvenon pola Samideanino.

DOMFRONT.- Kongres-foto, 3 NFr - Sin turni al S-ro VERON, Place Petite Bruyère, DOMFRONT (Orne) - C.C.P. ROUEN 1188-63.

---

## PONTO DE TANCARVILLE

Tre belajn bildkartojn pri Ponto de Tancarville eldonis "Union Esperantiste Française", 34 Rue de Chabrol, PARIS 10°. Mendu ilin (2 modeloj) kiel eble plej multnombre tial estas taŭga propagandrimedo por Normandio pere viaj eksterlandaj korespondantoj. Unu karto: NFr. o, 30 (afrankite).

---

## ĈU VI SCIAS KE .......

Pli ol 812.000 Genederlandanoj sendis peticion al la Nederlanda Registaro, petante devigan instruon de Esperanto en la Lernejoj?

---